

4/81

LEDOBO

GLASILO
SAVEZA
ZA
ESPERANTO
HRVATSKE

INFORMILO
DE
KROATIA
ESPERANTO-
LIGO

Godina 11 1982. 01. 27.

Broj 9 primjeraka 1500
Numero egzemplerojizdavač *Savez za esperanto*
eldonisto *Hrvatske*
*Amruševa 5/1, Zagreb*izd. savjet *Ljorka Begić*
eldonkonsi- *Ante Ferencić*
lantaro *Damir Mikuličić*
Ivo Rotkvić
*Željko Takač*glavni urednik *Ivica Špoljarec*
čefredaktoroodgov.urednik *Eduard Bačić*
resp.redaktoro

uredništvo / redakcio

Ivan Flanjak
Marinko Gijvojs
Ivica Špoljarec
Spomenka Štimec
Zlatko Tišljargrafički i tehnički urednik
grafika kaj teknika redaktoro
*Ivica Špoljarec*Nasl.strana / Titolpaĝo
*Mirna Krešić*Složeno i štampano u:
Kompostita kaj presita en:
Internacia Kultura Servo
Zagreb, Amruševa 5/1Adresa redakcije / Redakcia adreso
'TEMPO' Yu-41000 Zagreb
Amruševa 5/1, tel. (o41) 419-206

Izlazi tromjesečno / Aperas 4-foje jare

Cijena 1 prim./Prezo de 1 ekz.: 10 din.
God. pretplata / Jarabono: 40 din.**SADRŽAJ / ENHAVO**

Miroslav Krleža	4
Ivo Rotkvić	5
Strategija: taskoj de Esperanto-Mo- vado	7
Jesen 1981	9
Predsjedništvo SEH-a	11
Kalendaro	12
Iz osnovnih organizacija	14
Zdravo ĉaci !	17
Korisno i zanimljivo Utile kaj interese	18
Rijeka	20
Krucvortenigmo	22
Poezio	23

Ovako izgleda članska markica Saveza
za esperanto Hrvatske za 1982. god.:

DA LI STE JU VEĆ NABAVILI !

Po mišljenu Republičkog sekretarijata za prosvjetu, kulturu i fizičku kulturu SRH, broj
2788/1-1980 od 16. 4. 1980. godine, glasilo Saveza za esperanto Hrvatske „Tempo“
oslobodeno je poreza na promet proizvoda.



Kada se neke od ĉovjekovih zamisli i želja ostvare iz njih se raĉaju nove zamisli i nove želje. A to je ,eto , princip napretka i obogaćivanja. On se , naravno, odnosi i na „Tempo“.

Tokom dvije godine mi smo se trudili da vam ga izgledom, sadržajem i distribucijom što više približimo. Rezultat je ovo što držite u ruci i činjenica da ga poštari raznose na više od tisuću tristo adresa. No, znamo da kod nas ima još mnogo esperantista (i neesperantista) koji bi rado primali „Tempo“ i kojima bi mnogo koristile i značile u njemu objavljene informacije i napisi. Željeli bismo da ga , u 1982. godini, i oni primaju. A zanamo i kako to ostvariti! Potrebna je samo pažljivija i savjesnija evidencija članstva u pojedinim društvima i suradnja svakog od vas — tako da svoje prijatelje, znance i suradnike jednostavno upozorite na „Tempo“. Mi smo pak spremni da na vaš zahtjev zainteresiranima pošaljemo besplatan primjerak.

urednik

Kiam iuj el homaj ideoj kaj deziroj realiĝas el ili tuj naskiĝas novaj ideoj kaj novaj deziroj. Jen la principo de pliriĉigo kaj antaŭeniro. Ĝi , nature, rilatas ankaŭ a „Tempo“-n.

Dum du jaroj ni klopodis proksimigi ĝin al vi pere de ĝia aspekto , enhavo kaj distribuado. Rezulto estas ĉi revuo en viaj manoj kaj la fakto ke poŝtistoj kolportas ĝin je pli ol mil tricent adresoj. Sed ni scias ke ĉe ni ekzistas ankorau multaj esperantistoj (kaj neesperantistoj) kiuj volonte ricevus „Tempo“-n, kaj al kiuj certe utilis kaj signifus informoj kaj artikoloj aperintaj en ĝi. Do, nia deziro estas ke ankaŭ ili ricevu „Tempo“-n en 1982. Ni konas la vojon por realigi tion! Necesas nur pli atenta kaj konscia evidentigo de membroj en opaj societoj kaj kunlaboro de ĉiu el vi — tiamaniere ke vi atentigu viajn amikojn, konatulojn kaj kunlaborantojn pri la „Tempo“. Ni pretas je via peto sendi al ili senpagan ekzempleron.

redaktoro



MIROSLAV KRLEŽA (1893 – 1981)

Miroslav Krleža (Miroslav Krleĵa) estas escepta fenomeno en kroata kaj jugoslavia literaturo. Li eniris literaturon en 1914, sekve en la jaro kiam komenciĝis la unua mondmilito, kaj kiam mortis Antun Gustav Matoš, unu el la plej bonaj kroataj verkistoj antaŭ Krleža. Tiam la juna Krleža estis dudekjara kaj jam lia unua verko, la dramo „Legendo”, instigis akrajn polemikojn en la publiko. En la jaro 1919 li startigis revuon „Plamen” (Flamo) en kiu aperis lia eseo „Kroata literaturmensogo”, polemika programeca teksto en kiu li negacie traktas la kroatan literaturon kaj kulturen tradicion. Jam tiam estis klare ke temas pri verkisto kiu ne akordiĝas kun la kliŝoj de tiutempa literatura modo, sed ke Krleža estas verkisto kiu mem estas sia propra literaturmodelo kaj la propra mezurunuo por literaturvaloro. Per tio li elstarigas super la literatura tradicion kaj per sia enorma kreoforto superas ĉion kio ĉe ni estis kreita. Al tio necesas aldoni lian enciklopedian erudicion. Laŭ tio Krleža estas escepta persono ene de la tuta dudeka jarcento.

Li verkis dramojn, romanojn, novelojn kaj rakontojn, eseojn, recenzojn, poezion kaj artikolojn, tial lian kreadon estas maleble difini ĝenre. Liaj kompletaj verkoj ampleksas sepdek volumojn – fenomeno nekonata en la tuta dudeka jarcento. Li estis iniciatinto kaj fondinto de Jugoslavia Leksikografia Instituto.

Paralele kun lia verkado gravan lokon havas ankaŭ lia engaĝiĝo socia. Sep jardekojn li estis bastiono de la publika kaj kultura vivo kun forta maldekstra orientiĝo. Pro tio li estis celpunkto kaj de dekstre kaj de maldekstre. El tiuj kolizioj postrestis polemikoj kiel vera historio de nia sorto kaj popolo.

D-ro Ivan Krtalić

Verkoj de Krleža en esperanto: krom opaj poemoj aperintaj plejparte en la revuo „La Suda Stelo”, ĝis nun aperis libreto (22-paĝa) „Adriatika temo”, en la traduko de M. Demetrović (eldonis Bulgara Esperanto Kooperativo 1946) kaj libro „Renkonte al Krleža” (eldono de Internacia Kultura Servo, Zagreb 1982). IKS pretigas romanon „Rande de l' prudento” (traduko de Z. Tišljarić).



IVO ROTKVIČ

Ĉi-jare, Ivo Rotkvič atingis 80-an jaron de sia vivo. Li estas konata ekster la limoj de sia lando pro siaj kongresaj paroladoj, literatura verkado kaj kiel membro de Esperanta Akademio.

En la tempo inter la du mondmilitoj Rotkvič (naskiĝis en la jaro 1901) tre aktive partoprenis la jugoslavian Esperanto-movadon, plenumante, interalie, diversajn funkciojn kiel komitatano de la Esperanto-societo en Zagreb. Dum longaj jaroj estis nelacigebla redaktoro de esperantaj revuoj kaj lerta kursgvidanto. Krom tio kun dro D. Maruzzi verkis bonan kroat-esperantan vortaron.

Multaj partoprenintoj de niaj internaciaj kongresoj memoras lin kiel belstilan oratoron. Tamen, lian plej gravan okupon prezentas la tradukado de beletraj verkoj en Esperanton.

En la jaro 1934 la Budapeŝta revuo „Literatura Mondo” eldonis lian tradukon de la romano „Cezaro”, kiun originale verkis Mirko Jelusič. Tiu traduko signalis, ke aperis „kuraĝa tornisto” de nia literatura lingvo, kiel dirus Kalocsay.

En 1964 aperis lia traduko de „Tragedio en la Universo”.

Rotkvič en siaj tradukoj surprizis per sia eksterordinara vortfarado. Certagrade li daŭrigas la vojon de Grabowski, tiu granda vortomajstro en la komenca evoluo de Esperanto.

Rotkvič tra la tuta verko aplikas la senperan verbigon de substantivoj kaj adjektivoj, la kuraĝan vortkunmetadon kaj la tre larĝan uzon de adverboj. Dank’ al sia vere sorĉa komponado, li sukcesis, laŭbezzone mallongigi la frazon kaj ricevi tre fluan kaj vivecan frazritmon.


Por prezenti la stilon de Rotkvič, mi citos kelkajn frazojn el „Cezaro”:

„Li urs-paŝas apud la du-rada bovoveturileto”. — „Li ĉirkaŭ-saltas, ridgar-garas”. — „Bojege ekfuriozas hundo el sia dometo, rompserĉante la pintan ĉenon”. — „De la putorando saltas granda, blanka kato, kiu tie sunguis. Komi-noj dispaŝigas en kapturna timo, grupeto da anasoj indigne leviĝas, dum kelke da anseroj flugilante ekinsultas.”

La romano „Cezaro” ĝenerale estis bone akceptita de la kritiko kaj de tiu parto de la esperantista legantaro, kiu kapablas senti la vortomajstrecon de la tradukinto. Degenkamp, unu el la pli severaj recenzistoj, kiuj sinokupis pri la verko de Rotkviĉ, en la libro „Esperanto 60-jara” (Amsterdam, 1947) rekonas la valoron de la menciita traduko. En la enkonduko de sia lingvostuda verko li sendetene deklaras, ke Rotkviĉ „sciis uzi la lingvon en senco plej moderna, utiligante ĉiujn eblojn, kiujn Esperanto mem prezentas”. Kaj kelkajn paĝojn pli poste (p. 35) prezentante la ĉefkarakterizojn de „Cezaro”, li faras ankaŭ certajn riproĉojn, sed liaj finkonkludoj koncerne la verkon estas pozitivaj. Elstarigante la grandan diferencon inter la unua pionira provo (farita de A. Grabowski per „La Neĝa Blovado” de A. Puŝkin) kaj la dua (de Rotkviĉ) „efektivigita kvazaŭ eksperimente por pruvi, kion Esperanto povas „realigi”, li konstatas, ke „malgraŭ la granda diferenco, la unua esperantisto same facile legas la unuan provon kiel la duan artaĵon”. Fine li kun ĝojo konkludas, ke „ĝi estas evoluo pri kiu ni prave povas fieri”.

Krom la cititaj verkoj Rotkviĉ tradukis ankoraŭ kelkajn pli malgrandajn prozajn verkojn de jugoslavaj verkistoj Milan Ogrizoviĉ, Fran Maĵuraniĉ k.a. kiuj estas ĉu dissemitaj en diversaj esperantaj revuoj kaj gazetoj, ĉu presitaj en libroformo. Apartan atenton meritas la poeziaj tradukoj de Rotkviĉ, ankaŭ en la periodo inter la du militoj, precipe la tradukoj de kelkaj baladeskaj motivoj el la poezio de Mitroviĉ, Domjaniĉ kaj Vidriĉ, kiuj ankaŭ pravas la delikatsentan, unuarangan verkiston. Rotkviĉ verkis ankaŭ originale, ĉefe eseojn. Inter la plej konataj estas la antaŭparolo por antologio de Esperanta prozo „33 rakontoj” aperinta en 1961 ĉe „Stafeto”.

J. Velebit





STRATEGIAJ TASKOJ DE ESPERANTO—MOVADO

EN LA JAROJ 1982—1987

La ĉefa demando kiun la movado nun frontas estas: ĉu ĝi kapablos tiel organiziĝi ke la tajdon de monda intereso pri Esperanto ekestonta en la jubilea jaro 1987 ĝi povos eluzi kaj per ĝi transformiĝi al signifa kaj influa monda potenco (almenaŭ dekoble pli forta ol nun!)? Nome, la okazo kiu prezentigos ne tiel baldaŭ ripetigos. Estas pli ol versajne ke ne staras apartaj obstakloj sur la vojo de amasa informado pri Esperanto en 1987 (UNESCO certe donos gravan subtenon, multaj ŝtatestroj eniros la honoran patronan komitaton, publikaj informrimedoj certe pretos informadi pri tio). Sed, ve, kio poste?

Imagu, se subite malfortan movadon en iu lando (sen profesia personaro, sen instruistaro, sen sufiĉa kvanto da lernolibroj, sen kapablaj organizantoj) alimpetas ondo de dekmiloj kiuj volas lerni la lingvon kaj organiziĝi en la E-movado? ! Ne kapablante sufiĉe rapide reagi, respondi al la postuloj, la movado preterlasos la okazon. Post unu aŭ du jaroj ĉio forgesigos kaj ni ree dro-nos en nia letargio, kiu tiam, versajne pro seniluziigo eĉ pliprofundigos. Kion ni faru por eviti la fiaskon?

Ni devas kuraci nin de du gravaj malsanoj de kiuj ni nun febras.

La unua el la malsanoj de la movado estas la lingvoelitismo. Tio evidentiĝas en la fakto ke plej ofte la gvidpoziciojn ĉie okupas homoj lingve plej kapablaj, kvankam tre malofte ili estas ankaŭ organizate plej kapablaj. Tial la plejmulto de esperanto-societoj kaj organizaĵoj tute ne aktivis sed pasive, sektisme enfermitaj, atendas la Sanktan Tagon de la Fina Venko. Tio vidiĝas ankaŭ en literaturaj tendencoj. Preskaŭ ĉiuj eldonadoj strebas al la plej altaj lingvaj pintoj, tre malmultajn oni destinas al komencantoj. Preskaŭ ĉiuj internaciaj aranĝoj iel preferas lingvajn perfektulojn, tre malmultaj esceptoj antaŭvidas ion por la ĵus-bakitaj esperantistoj. La elitisma koncepto de la movado malebligas ĝin fariĝi amasa eĉ se por tio ekzistas eksteraj kondiĉoj, baras la vojon al junaj, kapablaj homoj stariĝi ĉe la stirrado de tiu ĉi esperanta „popolo”, kontraŭstaras eĉ la penson pri tio ke necesus antaŭvidi ian lokon en la E-komunumo por „balbutantoj” aŭ eĉ (ho kia herezo) por homoj sen lingva kono, sed kun bona volo aktivaj en ĝi. Kontraŭbatali la elitismon en la movado signifas porbatali la amasisman, aŭ la tiel nomatan desubismon.* Cetere, ekzistas nun ankaŭ bonaj ŝancoj por sukcesi en tiu batalo ĉar la nova konscio ke minimuman scion de Esperanto eblas rapidege akiri se la unua lernofazo baziĝas sur frekvencvortaro ricevita post komputila esploro kaj aplikita en instrumentoj de Jugoslavio, ebligas al grandaj amasoj rapide alproprigi la bazon de la lingvo.


Alia malsano, la diletantismo per kiu la preskaŭ senescepte amatora movado reprezentigas antaŭ aliaj, detruas grandparte ĝiajn ŝancojn. Nome, la movado mem eĉ kontraŭstaras la tendencon de profesiigo. Profesia servostrukturo produktas homojn kiuj ŝajnas danĝeraj por la „porĉiame certigitaj” foteloj al lokaj gvidantoj. Ne estas hazarde ke ĉiam denove oni elvokas la „internan ideon” kaj citas la vortojn de Zamenhof per kiuj li komence de la jarcento kontraŭstaris utilismajn tendencojn. Tiamaniere oni ŝtopas la buŝon de tiuj kiuj kontraŭbatalas la diletantismon per la plej alta aŭtoritato. Sekve, la nuna malforta stadio de profesia poresperanta agado ne ŝuldiĝas al „objektivaj cirkonstancoj” sed ĉefe al la movada kontraŭstaro al la profesiigo.


Sed oni devas konscii ke sen la profesiigo la movado neniam kapablos transsalti la nunan stagnan nivelon (30.000 membroj en UEA kaj sensignifa ekonomia povo). Amatore unu esperanta societo havas netransireblan limpunkton. Ĝi povas organizi 2 aŭ tri kursojn jare, sed kiam ĝi troviĝas en pozicio ke ĝi devas majstri la kontinuan funkciadon de dek kursoj samtempe, ĝi fiaskas. Tiun ŝtupon povas transsalti nur profesia agado. Jen la gravega dua tasko: konscie lukti por la startigo de profesia laboro kie ajn eblas. Minime landa asocio havu unu profesion sekretarion, sed kie ajn eblas pli, oni havu pli – teamon, aŭ plurajn teamojn, eĉ plurajn entreprenojn kiuj uzos Esperanton. Se ni sukcesos atingi almenaŭ minimuman profesiigon en pli-malpli ĉiuj landaj asocioj, la ŝanco por nova potenca movado kies voĉo devos esti aŭdata post 1987 estas sufiĉe realismaj.

Pensu, do, ĉiuj kies unua idealo estas la bazaj celoj – esperantigi la mondon – kaj ne uzi la movadon por siaj propraj etanimaj ambicioj aŭ plezuroj, ke la malamikoj de Esperanto estas inter ni!

Zlatko Tišljar

* Tio ne signifas ke ni publike bruligos altkulturajn atingojn de E-literaturo, aŭ pilorios perfektulojn de Esperanto – eĉ kontraŭe, ni daŭre stimulu per ĉiuj eblaj rimedoj pli bonan lingvokonon kaj uzon – sed nur kontraŭstaras diversajn privilegiojn de E-elito.





PRIMJER SURADNJE I RADA

U Bjelovarskoj ZO u toku su uspješne aktivnosti za osnivanje Saveza za esperanto Zajednice općina Bjelovar, koje su pokrenute na inicijativu Esperantskog društva Bjelovar, a prihvaćene od Esperanto-kluba „Koko“ iz Đurđevca i Esperantskog društva Koprivnica, do sada jedinih organiziranih oblika djelovanja esperantista na ovom području.

Ove aktivnosti popraćene su i pokušajem da se esperanto proširi i u ostale općine Bjelovarske regije, gdje do sada nije postojala esperantska aktivnost. Na inicijativu Konferencije Saveza socijalističke omladine Hrvatske Zajednice općina Bjelovar, u Bjelovaru je 7. 11. započeo s radom seminar za esperantske aktiviste, delegirane iz pojedinih općina regije. U omladinskom domu „7. sekretara SKOJ-a“ se okupilo 37 omladinaca i omladinki iz Čazme, Daruvara, Grubišnog Polja, Križevaca, Pakraca, Virovitice, Garešnice, te iz ti već postojeća društva u Đurđevcu, Bjelovaru i Koprivnici. Seminar je trajao 6 tjedana (održavao se subotom u popodnevrim satima), a polaznici su stekli znanja o općim pojmovima o esperantu kao jeziku i pokretu, o književnosti, povijesti, metodici podučavanja esperanta, općoj lingvistici, te proradili osnovni A-stupanj jezika esperanta.

Predavači na seminaru su bili: Dalibor Kudumija, Ljerka Stilinović, Marija Kapelac i Nenad Margetić iz Bjelovara, te Josip Pleadin iz Đurđevca.

Polaznici seminara će biti nosioci razvoja esperantskog pokreta u općinama koje su ih delegirale.

PULA — DRUGARSTVO, KULTURA I MLADOST

Omladinski esperantski susret i Drugi susret esperantskih kazališta održan je u Počitniškom domu Zveze borcov Slovenije u Banjolama (Pula) od 27—31. 11. 1981. u suorganizaciji Saveza za esperanto Hrvatske i Esperantskog kluba „Juneco“ iz Pule, te uz pomoć Omladinske zadruge iz Pule.

Susretu je prisustvovalo 120 esperantista iz zemlje i inozemstva i izvedene su tri kazališne predstave: „Ču dio bojas?“ — kazališta „La krizalido“ iz Figeaca (Francuska), „Saluto al paradizo“ — Studentskog esperantskog kluba iz Zagreba i „La juda edzino“ — Silvie Bonnet iz Pariza. Nakon izvedenih predstava održana je višesatna diskusija o problematici esperantskog teatra, koju je vodio dr. Vilmos Benczik.

U okviru susreta upriličena je akademija posvećena Danu republike na kojoj je o mjestu i ulozi omladine u međunarodnoj politici Jugoslavije govorio Goran Radman, član Predsjedništva SSOJ. Učesnici susreta su ponijeli sa sobom i sliku ovog podneblja doživljenog tokom „Istarske večere“, za vrijeme izleta po starim istarskim gradićima a najviše u gostoljubivosti i druženju s domaćinima — esperantistima Pule.

PREDSTAVE I NAGRADE – 14. PIF

Od 8–11. 10. 1981. godine održan je 14. međunarodni festival kazališta lutaka – PIF.

U dvoranama u Velikoj Gorici i Zagrebu, svoje predstave na esperantu izvelo je 8 kazališta lutaka: „L' Estaquirot“ (Barcelona), Krdžali (Bugarska), Constanta (Rumunjska), „Lalka“ (Vršava), Riga (SSSR), „Feniks“ (Niš), Pozorište mladih (Sarajevo), „Pinokio“ (Zemun), te izvan konkurencije Zagrebačko kazalište lutaka, amaterska lutkarska kazališta „Kvak“ i „Zlatni dani“ iz Zagreba.

Nagrada stručnog žirija pripala je Državnom kazalištu lutaka iz Constante za predstavu „Metamorfoze“ – Ovidija, a nagrada dječjeg žirija predstavi „Tajanstveni nilski konj“ – Kazališta lutaka iz Krdžalija. Pojedinačnu nagradu jezičnog žirija za najbolji govoreni esperanto na sceni je dobila Mima Janković („Feniks“, Niš), a kolektivnu izvođači predstave „Tajanstveni nilski konj“.

Ukupno 36 izvedenih predstava je vidjelo oko 14000 posjetilaca. Pojedine predstave su poklonjene djeci oštećenog sluha u Suvagu i djeci u Zavodu za rehabilitaciju djece oboljele od cerebralne paralize.

Održane su i popratne manifestacije festivala: 10. međunarodni susret djece esperantista, seminar za lutkare amatere i akcija „Pokloni svoju igračku“ u okviru koje su učenici osnovnih škola „10. lipanj“, „A. Cvetković“ i „V. Vlahović“ iz Velike Gorice, te „N. Luketić Kozarčanin“ iz Zagreba sakupili nekoliko tisuća igračaka koje su poklonjene Centru za rehabilitaciju djece oboljele od cerebralne paralize na Goljaku, Centru za socijalizaciju Tuškanac i Domu za djecu i omladinu Kaptol.

„MODERNA KROATIA PROZO“ KRENULA U SVIJET

Naša je književnost prisutna na esperantu od 1909. godine kada je Fran Kolar–Krom u nakladnoj tiskari Antuna Scholza objavio Šenoino „Zlatarevo zlato“. Prema kronici Zavoda za književnost i teatrologiju JAZU do 1981. zabilježeno je oko 300 bibliografskih jedinica.

Autori i tekstovi koji su dosad prezentirani međunarodnoj publici na esperantu najčešće su predstavljali lične sklonosti prevodilaca. Krtalićev izbor 34 novele od Matoša do Majetića tim je značajniji doprinos potpunijem predstavljanju hrvatske književnosti.

Izdavanje ove antologijske zbirke ne bi se moglo ostvariti bez pomoći RSIZ-a kulture. Knjiga je rezultat izdavačke suradnje dviju esperantskih ustanova Edistudio iz Pize i Međunarodnog centra za usluge u kulturi iz Zagreba.

Promocija ove knjige upriličena je u povodu Dana esperantske knjige, 15. 12., u prostorijama Društva književnika Hrvatske u Zagrebu u prisustvu dr. Ivana Krtalića, prevodioca Roger Imberta i lingviste Nikole Rašića.

Na promociji su uručeni autorski primjerci Vjekoslavu Kalebu, Ivanu Rasu i Josipu Barkoviću.

Na svojoj sjednici, održanoj 16. studenog 1981. god. Predsjedništvo SEHa je između ostalog donijelo slijedeće zaključke, prijedloge i konstatacije:

– Usvojeno je da se kao posebna točka Izborne skupštine SEHa raspravi tema „Međunarodna suradnja i manifestacije“. Tako da bi se na temelju analize dosadašnjeg rada, prijedloga Komisije za međunarodnu suradnju SEHa, društvenih dogovora, Zakona o evidenciji međunarodne suradnje, Prijedloga pravilnika o međunarodnoj suradnji SEHa i diskusija na skupštini donio dokument o međunarodnoj suradnji SEHa.

– Imenovana je Kadrovska komisija SEHa u čiji sastav ulaze: Ljerka Begić, Ivan Flanjak i Ivica Spoljarec (u pripreмноj fazi) te još dva delegata skupštine SEH.

– Predloženo je da regije dogovorno predlažu svog delegata za Predsjedništvo SEHa.

– Po povratku s odsluženja vojnog roka na dužnost tajnika Saveza za esperanto Hrvatske je od 1. 12. 1981. stupio Eduard BEČIĆ.

– Predsjedništvo je konstatiralo da se za tajnika SEHa može izabrati odgovarajuća osoba koja ne mora biti delegat niti iz redova Predsjedništva SEHa.

– Za delegata SEHa u Savezni odbor za pripremu kongresa JELa izabran je drug Josip Brkanac.

„Igre kisaunova“



kalendaro

JANUARO

29 – 31a

INTERNACIA SCIENCA SIMPOZIO: „Internacia informstemo kaj lingvaj problemoj de evolulandoj”. ZAGREB (Velika Gorica). Anoncoj al: KEL, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb. Partoprenkotizo: 250.- din.

MARTO

19 – 28a

ESPERANTO TEATRO EN BUDAPEŝTO : Turistaj tagoj kun Teatra Esperanto-Festivalo. Eblas partopreni 4 aŭ 10 tagojn. Pri detaloj skribu al HEA, pf 193, H-1368 Budapest.

26 - 28a

STUDENTA ESPERANTO-RENKONTIĜO en OHRID. Temo: „Ohrid – urbo de slavena alfabeteco kaj kulturo”, prelegas D-ro Cvetan Grozdanov. Prezo por dutaga restado estas 750.-din. Anonciĝu al: Dom humanitarne dejnosti, Daje Dumbazov 42a, 91000 SKOPJE (por Esperanto societo „La progreso”).

APRILIO

2 – 4a

INTERNACIA FESTIVALO DE HUMURO okaze de 25-jara jubileo de **STUDENTA ESPERANTO-KLUBO en ZAGREB.** Programoj ampleksos teatran vesperon, pupteatran prezentaĵon, ŝercoj, blagoj, satiroj, satira kanzonaro kaj ŝercaj filmoj. Eksterlandanoj ĉefe loĝos ĉe membroj de SEK (private). Limigita nombro. Anonciĝu tuj al: SEK, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb. Partoprenkotizo: 250.-din.

2 – 4a

JUNULARA ESPERANTO RENKONTIĜO en Nyiregyháza (Hungario). Informojn petu ĉe HEA, pf 193, H-1368 Budapest.

17a

3a RENKONTIĜO DE SLAVONIAJ ESPERANTISTOJ en Vinkovci. Anonciĝu al: Nada Med, Lenjinova 29, 56000 Vinkovci.

MAJO

1 – 3a

UNUAMAJA RENKONTIĜO DE ESPERANTO-JUNULARO en MOSTAR. Anoncoj kaj informoj: EL de BIH, V. Pe-
lagića 8, 71 000 Sarajevo.

9a

KVIZO PRI LA VOJAĜOJ DE TITO en Đurđevac. Anon-
ciĝu al KEL.

16a

JUGOSLAVIA JUNULARA KULTURFESTIVALO okaze
de la 90-datreveno de la naskiĝo de kamarado Tito. Kumro-
vec. Informoj kaj anoncoj ĉe KEL, Zagreb.

30 – 31a

60-a GERMANA ESPERANTO-KONGRESO - Münster.
Germana E-Asocio, Lambertstrase 12, D-6430 Bad Hers-
feld.

JUNIO

30 – 13a jul.

15a PIONIRA INTERNACI TENDARO – Zánka ĉe Bala-
ton lago (Hungario). Informoj kaj anoncoj por jugoslavo-
j ĉe IKS, pf 499, 41000 Zagreb.

JULIO

1 – 10a

INTERNACIA FERIADO POR GEJUNULOJ (12 -15 jaroj)
en Zadar (Borik) apudmare. Kosto: 3 800.-din, eblas pagi je
tri partopagoj. Anonciĝu al : IKS, pf 499, 41 000 Zagreb.

24 – 31a

67-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en
Antwerpen (Belgio). Anoncoj al UEA, Rotterdam.

31-- 7a de aŭg.

38a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO, Leuven
(Belgio). Informojn petu ĉe IKS, pf 499, 41000 Zagreb.



iz osnovnih organizacija seh

BJELOVAR

U toku listopada počele su s radom neke nove sekcije. Posebno se ističe rad pionirske lutkarske, baletne i dramske sekcije. Isto tako djeluju i recitatorska, likovna, zbor, informativna, pedagoška, filatelistička, te omladinska dramska.

05. 12. u okviru Omladinskog studija radio-Bjelovara emitirana je emisija povodom rođenja inicijatora esperanta L. L. Zamenhofa.

U povodu Dana Republike, postavljena je u Omladinskom domu izložba Općinskog saveza za esperanto Bjelovar s temom pokreta nesvrstanih i susreti druga Tita sa stranim državicima na putevima mira i suradnje.

19. i 20. 12. održan je 2. susret esperantista Zajednice općina Bjelovara u Bjelovaru. Organizatori Susreta su bili Konferencija SSOH ZOB-a i Općinski savez za esperanto Bjelovar.

ČAKOVEC

Čakovečki esperantisti su jesenas započeli s emitiranjem radio emisije na lokalnoj radio stanici. Uređen je i izlog s naslovom „Učite esperanto hodajući ulicom“. Trenutno su u toku dva tečaja u osnovnoj školi Strahoninec i Građevinskom školskom centru i oba se priznaju kao slobodne aktivnosti učenika.

22. prosinca je u povodu Dana esperantske knjige, organizirana izložba esperantskih knjiga i časopisa naših i stranih izdanja. Izložba je pobudila interes građanstva a uz nju je Normand Fleury održao predavanje „Evropa u očima kanadanina“ s podnaslovom „Svijet i esperanto“.

KRAPINA

25. 10 1981. održan je u Krapini susret esperantista Bjelovara i Krapine (Osnovna škola „August Cesarec“). Susretu je prisustvovalo 80 mladih, a protekao je u znaku obilježavanja 40-godišnjice ustanka naroda i narodnosti Jugoslavije. Ujedno je održano i natjecanje u znanju na temu iz NOB-a.

KRIŽEVCI

Tokom siječnja je u ovom gradu započeo tečaj esperanta kojeg, u prostorijama omladinske konferencije za 28 polaznika omladinskog uzrasta, vodi Vesna Bricelj. Ovaj tečaj je jedan od prvih rezultata bjelovarskog seminara (vidi: str. 9).

KUTINA

Obimna izložba o esperantu i esperantskoj literaturi je u toku posljednjih mjesec dana obišla Đački dom u Kutini, Srednjoškolski centar „Milenko Brković Crni“, osnovne škole „4. maja“, „25. maja“, „Stjepan Kefelj“ te Gradsku čitaonicu.

U Kutini su tokom jeseni i zime započela tri tečaja esperanta i to u OŠ „4. maja“, „25. maja“ i u Srednjoškolskom centru.

PULA

11. prosinca 1981. godine je formirana prva Osnovna organizacija Esperantskog kluba „Juneco“ u osnovnoj školi „Tone Peruško“. Organizacija okuplja 15 članova a predsjednik je Sandra Oliva.

U listi OK SSOH Pula „Pet“ (novembar), objavljen je, povodom dodjele priznanja RK SSOH E-klubu „Juneco“, razgovor s predsjednicom kluba Gordanom Plavšić o radu kluba i o susretu u Banjolama.

Tokom jeseni je u Puli održano pet A-tečaja esperanta u osnovnim školama i jedan B-tečaj.

SPLIT

U Studentskom domu „Ljubo Uvodić“ 16 polaznika-studenata je završilo A-tečaj esperanta. Oni su ujedno u prostoru doma započeli organiziranu djelatnost; osnovana je dramska grupa, u studenom je održano predavanje o „Kulturnom i jezičnom imperijalizmu“ koje je održao tajnik SEH-a Ivica Spoljarec a prisustvovalo mu je oko 60 zainteresiranih studenata.

VELIKA GORICA

U prosincu je Društvo za esperanto iz Velike Gorice u zajednici sa Narodnim sveučilištem „J. Kokot“ organiziralo i postavilo, u prostorijama knjižnice, „Izložbu minerala i fosila“ te esperantske literature o geologiji i svemiru. Izložba je otvorena 3. 12. u prisustvu društveno-političkih i kulturnih radnika ove općine, a na njoj je govorio i mg Vladimir Zebec. Izložba je trajala deset dana, a posjetilo ju je više stotina građana i učenika.

VARAŽDIN

U organizaciji esperantskog društva je, 12. studenog u Domu umirovljenika, Zdravka Metz održala predavanje „Esperantom po Japanu“ za stotinjak stanara ovog doma.

Uspostavljena je suradnja s Gradskom knjižnicom gdje je Marinko Gjivoje, početkom prosinca, održao predavanje o esperantskoj književnosti ; a ujedno je upriličena i izložbe esperantskih knjiga.

ZAGREB

4. studenog 1981. godine je osnovan
SAVEZ ZA ESPERANTO ZAGREBA (SEZ).

Na osnivačkoj skupštini, kojoj su prisustvovali delegati svih esperantskih društava koja djeluju na području grada, donesen je Statut i izabrano predsjedništvo kojem će tokom naredne godine predsjedavati Tea Ružić.

Dramska grupa SEK-a je svoju predstavu „Saluto al paradizo“ izvela 28. studenog na 2. susretu esperantskih kazališta u Banjolama (Pula) i 29. prosinca na 11-a Vintra Esperanto Ferio u Budimpešti.

Nakon održanog informativnog predavanja o esperantu, u Zavodu za rehabilitaciju tjelesno invalidne djece i omladine je početkom prosinca započeo tečaj esperanta za dvadesetak učenika smještenih u Zavodu. Voditelj tečaja je Ivica Špoljarec.

16. prosinca je u dvorani ŽTP-a uz prigodan program održana tradicionalna zajednička proslava Dana Zamenhofa svih zagrebačkih esperantista.

U prostorijama esperantskog društva, u Amruševoj 5, je tokom prosinca/siječnja održana izložba intarzija Stanka Novaka.

O B A V I J E S T

STUDENTSKI ESPERANTSKI KLUB iz Zagreba će od 2—4. travnja 1982. godine svečeno obilježiti **25 godina** postojanja i kontinuiranog rada.

POZIVAMO sve one koji su jednom bili članovi ovog kluba da nam se jave radi daljnjih informacija, te da prisustvuju proslavi.

SEK
Amruševa 5/1, 41000 Zagreb

zdravo



daci



SALUTON !

Iako je zima još u punom jeku valja već misliti na ljetna putovanja. Da li vam se to čini prerano? Ipak već sad se treba odlučiti za neka međunarodna ljetovanja, jer ako smo neodlučni ostat ćemo bez slobodnog mjesta. Predstavljamo vam dva moguća ljetovanja. Jedno u Mađarskoj, drugo u Zadru.

MAĐARSKA . I ove je godine Zanka na jezeru Balaton domaćin međunarodnog pionirskog logorovanja od 30. 06. do 13. 07. Učenici su smješteni u 10-krevetnim sobama i žive zajedničkim životom izviđačkog tipa. Rezervirana su mjesta za deset dječaka i deset djevojčica iz Jugoslavije. Ukupna cijena boravka je 3 500.-din, a može se plaćati u ratama. Rok prijave zajedno s prvom uplatom je 30. ožujka.

BORIK kod ZADRA — ugošćuje jugoslavenske i inozemne esperantiste stare od 12 do 15 godina. Termin ljetovanja je od 1. — 10. 07. 1982., a na programu su izleti brodom i autobusom, društvene igre, maskenbal, sportska takmičenja i slično. Cijena ovog aranžmana je 3 800.-dinara a moguće ga je uplatiti u više rata. Rok prijave i prve uplate od 1 000.- din je 1. 03.

Osim ovih putovanja razmatra se i mogućnost boravka u Ceseni (Italija) te u Bugarskoj. Ali o njima više drugi put.
Organizator ovih putovanja je : Međunarodni centar za usluge u kulturi, Zagreb, Amruševa 5/1 (tel. 419-206).



DOPISIVANJE

U Estonskom gradu Tallinu nastavnik Johannes Palu vodi tečajeve esperanta u osnovnim školama za oko 130 učenika (12 — 15 godina). Svi bi se oni željeli dopisivati i obećaju da će odgovoriti na svako pismo. Evo njihovih adresa:

1. Esperanto-klasoj, Tallinna 10. Keskkool, Raudtee 73, Estonio, SU-200016 TALLINN, SSSR.
2. Esperanto-klasoj, Tallinna 44. Keskkool, Keskuse 18, SU-200029 TALLINN, SSSR.



POZIVAMO VAS NA ZAJEDNIČKO PUTOVANJE.

KARAVANOM NA SVJETSKI KONGRES ESPERANTSKE OMLADINE u Luven (Belgija). Polazak iz Zagreba 30. 07. 1982. ujutro, povratak 08. 08. 1982. Putovanje autobusom i usputna noćenja u Stuttgartu iznose 3 600.- dinara, a moguće ju je uplatiti u ratama (I rata 1500.-din do 15.02., II rata od 1100.-din do 15. 03., III rata od 1000.- din do 15. 04.). Prevoznik Kvarner-express zadržava pravo povećanja cijene prevoza ukoliko u međuvremenu dođe do poskupljenja benzina i slično. Boravak na kongresu se uplaćuje u guldenima (210 - 300 guldena, ovisno o starosti) direktno organizatoru kongresa. Informacije, prijave i uplate: Međunarodni centar za usluge u kulturi, Amruševa 5/1, 41 000 Zagreb — tel. (041) 419-206.

POR PERFEKTIĜI LINGVE — LEGU I

Multaj homoj eĉ ne scias, ke ekzistas en la administra centro de Kroatio Esperanto - Ligo (legu: Amruševa 5/1, Zagreb) riĉa stoko de Esperantaj libroj. Temas pri la biblioteko de la Esperanto-Societo „Bude Borjan“, kiun rajtas uzi ĉiu esperantisto en aŭ ekster tiu societo (legu: ankaŭ vi!).

La libroj cirkulas po unu monato, kun ebleco plilongigi je ankoraŭ unu monato. Se vi ankoraŭ ne redonas la prunteprenitan libron, vin postkuros eksterlanda policano (legu: Jim Cushing, bibliotekisto).

La bibliotako estas malfermita ĉiumerkrede de la 6-a ĝis la 7-a vespere, kaj krome la bibliotekisto estas ofte en la ejo alitempe. Li volonte aranĝos specialan viziton por vi. Nur lasu mesaĝon por li sur la anonctabulo en la unua ĉambro, aŭ skribu al li ĉe KEL, aŭ telefonu al lia laborejo: (041) 272-611 (int. 431).

Libroj eventuale interesaj al vi inkluzivas la ĉi-sube listigitajn. —Ĉu li venis trakosme? (Johan Valano) — Paŝoj al Plena Posedo (William Auld) — Neĝa Lando (Kawabata Yasunari) — Kredu Min, Sinjorino I (Cezaro Rossetti) — Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto (John Wells) — ABZ de Amo (Hegler) — Esperanto Antologio (red. William Auld) — Ĉina Antologio — Tra Lando de Indianoj (Tibor Sekelj) — La Tundra Ĝemas (V. Eroŝenko) — Baza Literatura Krestomatio (red. Vilmos Benczik) — Plena Analiza Gramatiko de Esperanto (Kalocsay kaj Waringhein) — Mondo de Travivaĵoj (Tibor Sekelj) — Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado (red. Detlev Blanke) — La Besto-Farmito (George Orwell) — La Aventuroj de Tom Sawyer (bildrakonto, de la fama Mark Twain) — Asterikso (la fama humura bildstrio, en Esperanto).

Jim Cushing

UJEDINJENI NARODI

Generalna skupština Ujedinjenih naroda je na svom zasjedanju u studenom 1981. godine proglasila 1983. godinu „MEĐUNARODNOM GODINOM SPORAZUMIJEVANJA“. To je zapravo naša godina, jer se radi o temi o kojoj esperantisti imaju što da kažu i učine.

1985. godina su Ujedinjeni narodi proglasili „MEĐUNARODNOM GODINOM OMLADINE“. Te će se godine trebati svim sredstvima posvetiti poboljšanju životnih uvjeta mladih. I Svjetski esperantski omladinski savez (TEJO) član je specijalne komisije UNESCOa za pripremu programa Međunarodne godine omladine.

LUSIN I ESPERANTO

Najveći koneski pisac, čiju je 100-godišnjicu rođenja 1981. godine obilježio cijeli svijet, LUSIN, bio je veliki pobornik međunarodnog jezika esperanta. Iako sam nije pisao na tom jeziku, esperantski je pokret i njegovu književnost često pomagao. Držao je predavanja u esperantskom savezu Kine, davao materijalnu pomoć, pomagao da se izdaju djela prevedena na esperanto i s njega. U svom pismu kineskom listu „Svijet“ neposredno prije svoje smrti piše:

„Podržavam esperanto već više od 20 godina zato jer: — može ujediniti sve ljude svijeta, naročito potlačene, — može služiti kao sredstvo za međusobno upoznavanje literatura, — među esperantistima vidim ljude koji su iznad licemjernog egoizma svakodnevnice.“

LEKSIKONO DE JUGOSLAVIAJ ESPERANTISTOJ

Esperantisto-publicisto Marinko Gjivoje (P.š. 5025, 41040 Zagreb-Dubrava) finpretigas unikan manuskripton: Leksikonon de pli elstaraj jugoslavijaj esperantistoj, kiu devus esti prespretigita fine de aprilo ĉi-jare, kaj aperi libroforme jarfine. La kompilinto antaŭvidas ke ĝi povus enhavi proksimume mil biografiojn, de kiuj ĉirkaŭ 400 ilustritaj per bildoj. Ne temas nur pri verkantoj, tradukantoj, redaktoroj, movadgvidantoj, sed ankaŭ pri fondintoj de unuopaj E-societoj (ekde la jaro 1909), kuragvidantoj, prelegantoj kaj aktivuloj sur aliaj kampoj. En monato majo estos senditaj pli detalaj informoj pri la amplekso kaj prezo de la verko. Tiu de kiuj biografioj ne aperis sistempe (1964-1968) en Kajeraj, au havas kompletigojn, kaj aliaj kiuj post tio ne sendis al la kompilinto sian biografion, povos tion fari ĝis la fino de aprilo laste.

NOVE KNJIGE

TUTMONDA SONORO — pjesnička antologija koja sadrži 581 pjesmu 185-orice autora prevedenih sa 30 jezika na esperanto. Prevod: K. Kalocsay. Redaktor: V. Benczik. To je ujedno i glavno djelo objavljeno na esperantu u 1981. godini. Djelo je izdano u dva sveska na ukupno 700 stranica. Izdavač: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Prodajna cijena: 66 guldena.

IDEJA, EGZISTENCIJA I SAVREMENI PROBLEMI MEĐUNARODNOG JEZIKA — naslov je rada Zlatoja Martinova. Djelo je izdalo Društvo prijatelja međunarodnog jezika esperanta, Pančevo 1980. Sadrži 109 starnica formata 21x30 cm. Cijena: 150.-din.

THE SONNETS / LA SONETOJ — zbirka soneta Williama Shakespearea izdana dvojezično na engleskom i esperantu u prijevodu Williama Aulda, u seriji Oriento-Okcidento. Izdavač: Edistudio, Piza (Italija). Uvez u platno, 326 stranica. Cijena: 40.-guldena.

KATALOG KNJIGA — Međunarodnog centar za usluge u kulturi : sadrži popis, opis i cijenu udžbenika, rječnika, beletristike, političke literature, slikovnica, časopisa. Katalog je besplatan i šalje se na zahtjev. Adresa: Međunarodni centar za usluge u kulturi, Amruševa 5/1, 41 000 Zagreb — tel. (041) 419-206.



R I J E K A

Komence de ĉi-jarcento en naŭtiko Bakar oni sciis pri esperanto. Grupo de abiturientoj el 1900/01 jaro estis aktiva kaj arde postulis enkondukon de esperanto en la naŭtika. En tiu grupo la plej aktivaj estis Hreljinano Branko Ŝirola kaj Bakarano Dragutin (Karlo) Mikuličić.

Teofil Velnjčić en sia kroatlingve skribita libro pri Esperanto, publikigita en Dubrovnik en 1924, mencias Bakar kaj pri Branko Ŝirola skribas ke li estas arda Esperantisto kaj meritplena por la disvastigo de Esperanto. De 1924 ĝis la komenco de la intercivitana milito en Hispanio Branko Ŝirola estris la ŝipagentejon de la jugoslava ŝiparentrepreno „Oceanija” en Las Palmas (Kanarioj). Tiutempe Ŝirola estis delegito de UEA. Li vivis de 1884 ĝis 1974.

Ankaŭ Rijeka meritas enviciĝi inter E-pioniroj-urboj ĉar Teodor Kovács en 1904 esperantigis kaj en Rijeka gvidis kurson post kio en 1907 estis fondita la unua E-grupo.

Post la Unua mondmilito en 1922 fondiĝis E-societo en Sušak (urboparto de Rijeka). La 15-an de septembro 1936 okazis la fondkunveno de LES-filio (Laborista Esperanto-Societo) en Sušak, kaj en 1937 estis fondita E-societo „Adriatika Stelo”.

Post la Dua Mondmilito estis re-fondita la E-societo, kiu ricevis la nomon „E-societo Aleksandar Sandor Turkovič” laŭ falinta samideano. Sekvis E-kursoj; en 1958 plimultiĝis gejunuloj en la societo, krom tio ekaktivis Fervojista E-societo.

Siajn organizkapablojn la esperantistoj en Rijeka montris kelkfoje: en 1957 okazis en Rijeka brila 9-a IFEF-kongreso; en 1959 2-a Kultura Festivalo (650 partoprenantoj); en 1964 la 18-a Kongreso de jugoslaviaj esperantistoj; en 1980 la 53-a Internacia kongreso de SAT kaj en 1981 la 13-a Trilanda Esperanto-Konferenco.

Kaj jen tre mallonge pri la hodiaŭa situacio en la regiono:

PAZIN

Ekde la aŭtuno 1981 kvardeko de mezlernejoj komencis lerni Esperanton kaj aktivi kiel grupo. Kurson gvidas Dobrila Korač.

Korespondadreso:

Srednjoškolski centar
„Otokar Keršovani”
(za grupu esperantista)
Ĝetaliste narodnog ustanka 9
51400 PAZIN

PULA

En Pula aktivas Esperanto-klubo „Juneco”. La klubo havas 130 anojn. Momente oni gvidas naŭ A-kursojn por ĉirkaŭ 120 gelernantoj de elementaj lernejoj kaj 15 mezlernejoj vizitas B-kurson. La klubo fine de novembro 1981 sukcese organizis Junularan Esperanto-Renkontiĝon kaj Renkontiĝon de Esperanto-Teatroj. En la klubo plej aktivas Jadranka Radunković kaj Gordana Plavšić (momente prezidantino).

Korespondadreso:

Esperantski klub „Juneco”
pp 26
5200 Pula

RIJEKA

En Rijeka en E-societo “A.Ŝ. Turković” kolektiĝas ĉ. 70 anoj, sed en

la urbo vivas ĉ. 200 esperantistoj. En 30 lastaj jaroj E-kursojn en Rijeka vizitis ĉ. 1500 loĝantoj.

Anja Hurčak gvidas en la societejo E-kurson por 12 anoj, Stjepan Đuretić en elementa lernejo „Centar” (10), Kristina Markov en elementa lernejo Kozale (32). Societan bultenon „Heliko” redaktas Kristina Markov. Miodrag Simić gvidas Spertan E-societon (kvar sekcioj po ĉirkaŭ 20 anoj). La pedagogian sekcion gvidas Anja Hurčak. Sekcion de la Esperantistoj fervojistoj gvidas Rudolf Hoić. Societa biblioteko posedas ĉirkaŭ 600 librojn. Prezidanto de la Komunuma konferenco de la Ligo por Esperanto en Rijeka estas Stjepan Đuretić.


Korespondadreso:


Esperanto-societo „A.Ŝ. Turković”
Korzo narodne revolucije 27a
51000 Rijeka

Rade ŠKALAMERA

fotis I.Š.

Amfiteatro en Pula





KRUCVORTENIGMO

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO EL LA NUMERO 3/81:

SEMAJNO, ERATUMO, NAŬ, V, M, NOR-VEGO, A, IEL, T, CITRI, O, INA, SA, U, NUTRI, LUI, OTO, OZON, ON, O, ET, O.

J. P.		Lando en Ameriko ↓	Planedo ↓	lip por balanco R. A. ↓	Tagno-mo ↓	O ↓
Haladza malpuriga →						
	Efektiva →					prepozicio ↓
Lavit(a) →	Teatro de pupo ↓			Oralkapabl(0) ↓ korel. vorto ↓		
U.G. →			Merlanta lon →			
Plena vortaro →			Karakterizo → Islama s libro ↓			speci-ala ↓
Urba transportilo →						
Ŝambro →				arbara best(o) ↓ Kolekto de dokumentoj ↓		
Korartario →					Membro ↓	
		Asocio Esp. → Sufikso ↓			Sufikso → Sufikso ↓	
Randevu(o) →						
Flava metalo →				Biblio-heroo →		



Miroslav KRLEŽA

KHEVENHILLER

DE LA PLEJ LUMBRILA GRANDDUKO CAROLUS
ARMEESTRO LANDGENERALO
KHEVENHILLER KONSTRUAS NOVAN DIGON
GRANDSINJORAN FORTIKAĴON CAROLSTADIUM
PER SERVUTLABORO

A.D. 1579

Neniam ja estis tiel
Ke ne estis iel.
Kaj neniam restos
Ke iel ne estos.

Nome: Kiel estus se ne estus iel?
Estus kio is neniam, estus ja neniel.

Tamen ĉiam estis ke estis ja iel,
Kaj neniam estis ke estis neniel.

Kaj tiel estos por ĉiam, ke iel estos jam
Kio por esti estas, ĝi estos ĉiam.

Sed neniam estis ke estis neniŭ
Kaj neniam estos ke ne estus iu.

Kiel estas estas, tiel estis ĉiam
Kiel estos estos, kaj estos iel esti jam.

Sed nek estis iam nek povas ekesti
Ke servutulo de l' servuto rajtas foresti.

Ja neniam estis kaj ne povas esti
Ke servutulo armilojn ne devas vesti.

Kiel ajn ĝi estis, estis tiel tamen
Kiel estis tiel estas, kaj iros nur saman.

Kiel ĉiam estis tiel este pluos
Ke servutulo fortikaĵon konstruos

Levados digojn, portados mortaron
Kun vosto interkrure kiel hundo mizeron.

La servutulo ne scias ĉu estas divido glata
Ke li malsatas apud sinjoro sata

Sed neniam estis ke ne estis tiel
Kaj neniam estos ke li satu iel.

Estas ja infero sur ĉiel' kaj tero
Fine venos Turkoj, ne restos eĉ ero.


Al servutulo samas morti en stalo
Aŭ sub katedrala tegmento

Ĉar krom hunda fekaĵo sur lia tombo
Estos nenia monumento.

Tradukis : Nikola Ralić



MODERN KROATIA PROZO



NOVA ANTOLOGIO!

MODERNA
KROATIA
PROZO

Enhavas 34 noveloj verkitaj en tiu ĉi jarcento de la plej bonaj kroataj verkistoj.

Redaktoro: D-ro Ivan Krtalić.

Tradukis: Roger Imbert.

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Zagreb kaj Edistudio, Pisa. 15x20 cm, 604 paĝoj, prezo 700.-din (58 guldenoj).

Mendu ĉe : IKS, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb.

RENKONTE

AL

KRLEŽA

Tiu libro estas elekto el la verkaro de Miroslav Krleža en esperanto. Ĝi enhavas unu novelon, ĉapitron el la romano „Rande de l' prudento”, kelkajn poemojn kaj aliajn tekstojn.

Tiamaniere la libro donas bazan superrigardon pri la verko de Krleža.

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Zagreb 1982. 14x20 cm, 64 paĝoj. Prezo: 50.- din. Mendu ĉe: Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb.

renkonte

al

Krleža